

PENSEO

N-ro 383

sept. / 2023

**Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994**

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 34-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

Tiberio Madonna (Italio)



Aŭtuno verda

Sur la aleoj
tegitaj per tapiŝo
farita el foliaro
friska blovo aŭtuna
reportas mian menson
al la nuntempo
al la koloroj de l' hodiaŭo
deturnante min de la pensoj
pasantaj
de la koloroj de l' hieraŭo:
ruĝo, flavo, hela bluo...
ĉi-somere la brilaj koloroj
sur papilioj, sur floroj,
sur folioj zorge farbitaj
per bela verd' intensa
gajigis la paŝojn
sur ĉi samaj aleoj
invitante nin danci;
la lingvo de l' naturo
kiu invitas ami
estas lingvo universala
ia "Esperanto flaŭra"
kiun ĉiuj komprenas
ĉiuj popoloj
de l' mondo;
kaj la folioj de l' platanoj
kiuj susuris ĉe la brizo
verdaj kaj steloformaj
kun siaj kvin pintoj

vere memorigas al mi
ja multe
la stelon de Esperanto
la stelon verdan
kiu unuigas
ĉiujn popolojn
de l' mondo.
Ĉiuj tiuj steloj
kiuj nin rigardis
ĉi-somere
de la platanaj branĉoj
montris gajaj en la sunlumo
sian intensan koloron
sian intensan verdon.
Nun
en aŭtuno
bruniĝintaj la folioj
estas ĉiuj jam falintaj
kaj kraketas sub la paŝoj
kiuj komencas tristiĝi
lantiĝi
mediti...
jen la diferenco
inter la platanaj folioj
kaj la stelo de Esperanto:
dum tiuj estas jam brunaj,
pale flavaj, ruĝetaj
kaj falintaj sur la ŝtonojn
donante rendevuon
por la venonta printempo,
la stelo de Esperanto
ĉiam verdas, ĉiam vivas,
montras sian koloron neŝanĝita
sian verdon originan

vivan kaj brilan
 kiu refarbas la tristecon
 ĉiam varmigas nian koron
 kaj diras nian ĝojon
 per la sama vorto «ĝojo»
 al ĉiuj popoloj de l' mondo,
 disvastigante ĝin libere;
 kaj tiel, per Esperanto,
 nia aŭtuno ja estas
 ankoraŭ
 verda.

Moissey Bronshteyn (Rusio)



Min ofte premas meditado trista, kaj do
 en miaj pensoj, kvazaŭ gaja sunradi'
 aperas ĝua rememor' pri l' kanta Kajto,
 de kiu ĉiam vivdeziron ĉerpas mi.

Publikon lerte instiganta kanti kune,
 levanta ĉiujn en komuna voĉ-impet',
 la paro ĉarmas, kaj mi skrapas nukon: ĉu ne
 pli gravas vere prezentanto ol poet'?

Sed tuj irante for de la stultaĵ' envia
 kaj aliĝante al la gaja kunkantad',
 sincere ĝojas mi, ke l' itinero viva
 venigas foje min al Kajta vivopad'.

Ne pensante pri ripoz' en
 svarma bolo de l' kongres',
 Mi prezentas mian prozon.
 Aŭdas min kun interes'
 kelkdek sobraj prozŝatantoj,
 kaj mi provas sen edif'
 per paroloj miaj vantaj
 komprenigi pri l' motiv',
 min pelanta al klavaro,

al ekrana virga pur'
 por en ŝtorma vorta maro
 kapti indajn vortojn nur.
 Kaj se gapas min elane,
 kompreneme la medi',
 mi kontentas, ĉar ne vane
 tiujn vortojn kaptis mi.

Adiaŭ Torino la ŝvita,
 la suna, la ŝtona-palaca,
 de nia kongreso benita
 por vivo senzorga kaj paca.
 En vasto de parkoj kaj stratoj,
 en ombro de ark-galerioj
 kun karaj amikoj, konatoj
 mi vagis, kaj estis ebriaj
 ni ne pro l' abunda biero,
 nek pro la bongusto de vinoj,
 sed ĉar kelkajn tagojn sur Tero
 por kuno ofertis destinoj.

Rita Mkrtĉjan (Armenio)



Ni atendas miraklon en vivo,
 Kaj ne gravas la aĝo, la tempo,
 Niaj revoj similas foliojn,
 Kiujn turnas senlace la vento.

Ravas nin la ĉielo stelplena,
 Suna bril', de la tag' mateniĝo,
 Ni atendas miraklon de vortoj,
 Amrigardon kaj la renkontiĝon.

Ni atendas plej belan poemon,
 Ke revenu malnova amiko,
 Sonu kant', kiun longe atendis,
 De animo — muziko unika.



Ángel Arquillos (Hispanio)



Pluvegas

Pluvegas,
 kaj la domon mi ne vidas,
 ĉar neniu min atendas,
 Dio, kion mi pretendas?
 Mi preĝas,
 sed la ĉiel' min ne aŭdas,
 ĉar mia voĉo mutiĝas
 kaj la domon mi ne vidas.
 Mi plendas,
 ĉar neniu min atendas
 kaj tra la padon senfinan
 mi kun timeg' piediras.

Klaus Friese (Germanio)



Lulkanto

Dolĉe dormas jam la sun', nun montriĝas lun'.
 Ĉiu stelo en ĉiel', brilas kiel juvel'.
 Brilas kiel juvel', en la nokta ĉiel'.
 Dolĉe dormu nun, ankaŭ dormas sun'.

Dolĉe sonĝas la marmot', sonĝas pri karot'.
 Kuŝas ĉarme en kavern', lumo de l' lantern'.
 Lumo de l' lantern', por marmot': kavern'.
 dolĉe sonĝas ĝi, ankaŭ sonĝu vi.

Dolĉe paŭzas pluv' kaj vent', pace en konsent'.
 Ĉiu kuŝas en trankvil', krom la krokodil'.
 Krom la krokodil', ronkas dum trankvil'.
 Dolĉa la bruet', ronku en duet'.

Vigla melodio

Lasu sunon brili
 kie ajn vi estas nur.
 Lasu botojn marŝi.
 Eku nun, per ĉiu krur'.

Vent' kaj nuboj sen potenc',
 malproksime kuŝas senc'.

Prenu dorsosakon,
 nur kantaro en la poŝ'.
 Postlasu tabakon.
 Estas grava ĉiu groŝ'.

Liberec', freŝa aer'
 helpas kontraŭ la mizer'.

Sunradioj brilas en la kor',
 la feliĉo ne plu estas for.

Sunradioj helaj, kun varmec',
 sunradioj, la ĉiela pec'.

Somero

Somero kun suno ĝojigas la homon.

La homo tre ĝojas pro tiu feliĉ'.
 Varmeco ebligas forlasi la jakon.
 Ni estas kontenta pri tiu kondiĉ'.

Tre grava kondiĉo por bela ferio.
 Ni kuŝas sur plaĝo en varma aer'.
 Ripozo sur sablo, malstreĉa defio.
 Naĝado en akvo, agrabla afer'.

Afero danĝera por ĉiu farmisto,
 ĉar mankas la pluvo, por plantoj
 turment'.
 Sekeco tro longa. Avertas gardisto.
 Ekbrulas facile la pajla tegment'.

Arbaroj jam brulas, la cervoj forfuĝas.
 Leviĝas la fumo, malhelas ĉiel'.
 Danĝero por vivo, do ĉiu forkuras
 La perdo de ĉio, eĉ de la juvel'.

Juveloj ne povas alporti la savon.
 Batal' kontraŭ fajro, batalo sen fin'.
 La jetoj el akvo reduktas damaĝon.
 Pri pluvo decidis nur bona destin'.

Wally du Temple (Kanado)



Balena dankesprimo

Okulo de baleno
 reflektanta lageto en maro,
 la dankesprimo en okulo,
 liberigata de skuba plonĝisto
 de ŝnurreta fiŝkapta koŝmaro,
 Ĉu universalas de senkulpa kaptito?

Etaj Limonadistoj

Ĉu io pli Kanade nostalgia somere
 ol kruĉeto, citronoj, akvo, sukero, glasetoj,
 kaj kirlantaj kuleroj fingre agigitaj de infanoj
 gaje sidantaj en seĝetoj ĉe apudvoja tableto
 atendente la halton de aŭto por vendi
 kun panjo
 limonadon?

Bioma Pakto

Kiam abstraktaj ekzistadaj demandoj
 preskaŭ forhakas mian orelon—
 flustras 'Stela Stela Nokt' de Vincent van Gogh
 sugestion de estiĝa paradigmo
 ke la mondo estas pli grava ol mi mem
 ke birdoj kantas, floroj dancos en maten'.
 idea salt' al universa aparten'
 evolua memkonscio por vivten'
 kaj arbustoj mantelas verdajn foliojn
 kaj rozaj azaleoj koloras tagojn
 akveca nebuloza privilegio
 vivabunda tergloba biologio.
 Alaŭdoj anoncas ĝin sunleviĝe

Floroj dolĉfruktojn kreskigas klorofile
 Necesas ne strebi sed akcepti la fakt'
 per kosmogenezon vivas BIOMA pakt'.

Lenke Szász (Rumanio)



Ĉu vere?

Ĉu vere tio estas la feliĉo,
 Ĉu tio donas feliĉon al vivo:
 ricevi tuj la ĉiuspecan ĝuon,
 Havi de ĉiu deziro plenumon?
 Sen limo, sen brido havi ĉion ajn,
 Ĉu akiri sen lukt' ion valoran?
 Amoro, ĝu' facile akirita,
 Ĉu feliĉigas vin nemeritita?
 La vasta spaco plenas je bruego,
 Amaso ŝajne ĝojegas per kriego.
 Post jardekoj io en koro restos,
 Ĉu anim' la falsan feliĉon festos?

Yi Qiao (ĉino en Germanio)



Beleco kaj feliĉo

Vera beleco
 estas en nia vivo
 la virta deco.

Vera feliĉo
 dependas de la peno
 por la delico.

Riĉaĵon havi
 ne tiel gloras kiel
 animon savi.

Ne temas celo
 eltrovi la feliĉon,
 sed survojbelo.

Veran feliĉon
ĝuas ni kun aliaj
eĉ la delicon.

Soneto pri spiro primavera

Nun returnas linda primavera,
Tra arbaro freŝe brizo lantas.
Ĝus vekigās la dorminta tero,
Orioloj sur salikoj kantas.

Kun espero verdas la kamparo,
Apud lago jam narcisoj floras.
Mevoj ŝvebas vigle super maro,
Spiro primavera bonodoras.

Blankaj nuboj flirtas sur ĉielo,
La hirundoj hejmen jen revenas.
Inspirate de l' fruĵara belo,
Novan mondon ni sincere benas.

Kore nin salutas tage l' suno,
Al ni bondeziras nokte l' luno.

Horizonto

Jen stelparo en la horizonto,
kiel la okuloj de mia revmondo.
En mia koro flosas nebulo matena,
kiel via tenereco de lastnokto bona.

Mi volas grimpi sur la monto kruta,
serĉe la figuron el nebulo muta.
Mi volas rajdi sur ĉevalo,
por ĉaso al lontana la stelaro.

En horizonto estas arbo ja giganta,
kiel verda ombro mia en la koro.
Estas alta monto en la foro,
tio estas via vasta sino granda.

Mi volas pluki sub l' arbo aspiron,
plektante belan revsopiron.
Mi volas sub la monto paŝti libere,
sekvante viajn spurojn sincere.

Mi deziras rajdi sur ĉevaloj kun vi,
galopante en profundo de la stepo.
Mi deziras flugi kune kun vi,
vagante sur blua la volbo en ŝvebo.

*Esperantigita surbaze de la ĉina amkanto
de Jirgol (lirikisto).*

Jadranka Miric (Serbio)



Somera ŝtormeto

Kolombino fluganta
preterpasas kornikaron kirlantan
kiu estis laŭte graktanta.
Ĉu anonciĝo de somera ŝtormo?

Griza nubo kiel granda sapo
pendas super kapo mia.
Ĉio odoras je pluvo.
Jam troviĝis pluvombrelo en la mano
via!

Baldaŭ klariĝos ĉiel'.
Dank' al pluvo aero freŝiĝis.
En branĉar' gaja pepado komenciĝis.
Ĉi pluvo valoras kiel matena kulero de
miel'.

Ruĝa kruco

Ekscitita mi ,
pro belaj vortoj adresitaj al vi ,
staris mi malantaŭ vi
rigardante vin fiere .

En viaj manoj dankleter'

pro via malegoistaj sangdonacoj
multjara .
Miaj okuloj mildas eĉ larmas,
samkiel ĉi printempa veter'.



Neatendita ĝuo

Jam okazis Foiro tradicia ,
allogis sian loĝantaron
por ĝui en verda Akacia
arbarparko. Precipe junularon.

Suna varmega tago.
Homoj en promenado
post pasintnokta abunda pluvado.
Pro aeromalsekeco homoj lamentis pro
ŝvitado.


Agrablaĵo ofte okazas neatendite.
Okuloj kaj kruroj laciĝis.
“Sidiĝu ni, ĉi-tie!”
Dirite farite.

Sed kiel trovi neokupitan benkon!
Feliĉe unu grizhara s-ino
eksvingis al nia direkto: “Maljunulino,
bonvolu sidiĝi vi ĉe mi!”

La nekonata sinjorino
fakte estis mia longjara amikino.
La vivo belas, ĉu ne?
Ni ĝuis multe!



Ivanichka Magharova (Bulgario)



Somera tago.
En nebuloj sonadas
kanto de l' griloj.

Ĉaskorno kantas
en la arbaro. Birdoj
estas sorĉataj .

La laca tago
foriras kun tristeco.
La ĉambro mutas.

Griza kolombo
portiĝis el la kaĝo
“Libereco , Sanĉo !”

Kanto de grilo
sur la kampo resonas.
Gren' maturiĝas.

Krepusk' finiĝis
mont' malsupreniris.
Agloj forflugas.

Maneĝo. Klaŭno.
Fanfar' sonas. Li sola.
Larmo en okul'.

La nokto falas.
En nebul' iu kuras.
La dom' malplena.

Odoras siring'
en la solecaj noktoj.
Malĝojon pelas.

Kantas la klavoj

en siringaj belnoktoj.
Amo jam venis.

Gastas malĝojo
en la ĉambro malvarma.
La amo frostas.

Elena Popova (Bulgario)



Lumo kaj brilo

Matura tritiko.
Inter la nigraj nuboj
lumas espero.
Akvolilioj –
mildeco kaj purec' en
akva brakumo.
Impeta birdo
al floranta floro. Ja
Instinkt' pri Ĉiam'.
Junulin' iras
tra lavenda kampo.
Tera beleco.
Ter' kaj Ĉielo –
rigardoj trans la nuboj.
Barkoj en la mar'.

AMIKECO

La viv' finiĝas iam,
sed je la tero.
Ĝi estos pritaksita
laŭ niaj faroj.
Ni portas amon
en niaj koroj
kaj ĝin forprenos iam
kun la animoj.
Sed la amikec' floros
kaj en la ĉielo,
ĉar ĝi lumas ĉiam

en nia animo.

Parolado kun la soleco

Kiu flustras ĉirkaŭ mi?
– Mi estas, la Soleco.
– La Soleco? Sekve vi ne estas muta? Kiu vin sendis?
– Ĉu vi ne memoras? Vi invitis min.
– Mi ne estis malŝlosinta la pordon.
– Ne, sed mi havas ŝlosilon pri ŝlositaj pordoj.
– Iru, mi volas neniun ĉirkaŭ mi!
– Pro tio mi estas tie ĉi, pro bedaŭro.
– Kion vi volas?
– Ke ni interparoladu!
– Mi ŝatas la silenton. La Fato decidis, ke mi estu sola.
– Kara, nenion decidis la Fato, la vivo estas via propra elekto!
– Ne! ...Eble...

Jurij Ribĉinskij

Flugis la sovaĝanseroj

(kantteksto)

Flugis la sovaĝanseroj,
En dimanĉo pluvaflugis super ter'.
Falis plumo tra l' aero
Kaj surkorte malaperis en la herb'.

La sovaĝanseroj iam
Flugis milde tra l' arbara fantazi'.
Amikin' ne sciu via,
Kies koraletojn ame portas vi.

Kiam frapos nokt' malhela
Al fenestro jam,
Ne demandu vi sencele
Min pri mia am'.

Flugis ili en aŭtuno,
Al saliko sola estis longa voj'.
Nur duop' feliĉas kune,
Sed triopo plukas berojn de malĝoj'.

Flugis ili tra l'arbaro,
Tra la bosko verda en vespera hor'.
Venos amikino kara,
Sed por ŝi fermita estu via kor'.

Flugis antaŭ la aŭroro
La anseroj tra la nokta halucin'.
Gardu amon en la koro
De la sorĉoj kaj malbono, junulin'.

Kiam frapos nokt' malhela
Al fenestro jam,
Ne demandu vi sencele
Min pri mia am'.

Flugis ili en aŭtuno,
Al saliko sola estis longa voj'.
Nur duop' feliĉas kune,
Sed triopo plukas berojn de malĝoj'.

Diana Holde

Floro-anim'

(kantteksto)

Ho, ja ne stel' lumis enĉiele,
Flor' sur la ter' jam disfloris hele,
En silka herb' en magia hor',
Venis aŭror', sed forestis tie flor'.

Ho, ja ne flor' belis kaj foriris,
Ho, la anim' al feliĉ' aspiris,
Floro-anim' sola en la viv',
Vortojn de ĝi portas vent' al mi kaj vi

Donu la Di' forton!

Donu la Di' bonon!
Venu feliĉ' domon!

Kie Printemp' dancis en la baloj,
Ĉarmis la flor' ĉiam per petaloj,
Songo kaj rev', mola verda herb',
Nur la anim' flore vivas en tener'!

Donu la Di' forton!
Donu la Di' bonon!
Venu feliĉ' domon!

Kial vi ne venis?

(ukraina popola kanto)

Jam subiris sun'
kaj arĝentis lun'...
Kial vi ne venis?
Mankis la ĉeval'
aŭ vojet' tra l' val',
ĉu patrin' retenis?

Pretis la ĉeval',
estis voj' tra l' val',
panjo min delasis,
sed la junfratin'
malĝojigis min,
ie selon kaŝis.

Sed la grandfratin'
baldaŭ trovis ĝin,
la ĉevalon selas:
"Rajdu al knabin',
ŝi atendas vin
kaj al vi fidelas".

Fluas riveret',
bluas en kviet',
bela kaj radia.
Edzinigu min,

ho, kara patrin',
kun amato mia.

Jam subiris sun',
kaj arĝentis lun',
Jam subiris sun'...

Elukrainigis



Petro Palivoda

(Ukrainio)

Mimoza Ahmeti



Trovu internila kialon

Strange,
Ĉiam truon por eniĝi trovas,
Lokon trovas,
Eĉ ankaŭ en mia spirito tiom severa,
La soleco

En mia kuniga spirito
Kisanta kvazaŭ frenezulo
Kaj iranta fierulo
Sur la vojo de la reganto
De la emocioj.

Jen do, ĉi tie, nur ĉe mi
Tiu malpura larvo trueton faras
Kaj eliras
Tien, kien mi apenaŭ ekspektas,
Kiam spirite min forta sentiĝas
Kiom la Demiurgo tagon de la kreado.

Ĝi perfide, maldolĉe
Mian potencon frapas
Kaj mian kapon mallevas
Kvazaŭ arbon
Kies trunkon oni kaŝe nokte forsegis

Dum oni tagiĝis.

Ŝi, ŝi, ŝi...
Homoj,
Mi ĉie vin serĉis
Ne suferante pri vi, per sinjorinaj larmoj,
Mi vin amis
Forĵetante en la debila momenteto.

Mi vin alvokis
Per potenco bestia
Ina, maskla, homa,
Vin sentante
Surnuke, surkokse, surskapole,
Dispeciĝante
Sur via masivo.

Sed ŝi
Trovas inter ni la kialon,
Eniĝas
Kaŝe, malkaŝe,
Nin primokas,
Tiam, kiam nia venko tiom proksime
estas
La viskozan kapon eligas
Kun elstaraj okuloj pro timo
Kaj per fleksebla rigardo la medolon
kaptas,
Sentigante niajn ostojn solecajn
En la ekzistenciala esenco.

Nepre okazos tio, kion vi volas

Kapricema aperis ĉe vi la naturo
Demandante ankoraŭfoje la rajton je
refariĝo.
La patrino de la eterneco, la renoviĝo
Naskis vin aliajn rason kaj sangon
Enuigis vin la malnovaj amikoj.
Volu do, ĉar nepre tio okazos.
Okazos tio, kio hodiaŭ enombre vibras,

Tio kio tremece vin sugestigas.
 Nur la stelojn kaj la nokton vin havas kun
 vi.
 La nokto estas danĝera kaj freneza.
 Bezonas vi tian mallumon, densan,
 Por ke kaŝiĝu la nigraj katoj dumtage
 Kaj vin lumigu la radiantan penso
 De alia tago, de alia raso.
 Volu do, ĉar nepre tio okazos.

Elalbaniigis



Bardhyl Selimi (Albanio)

El Ĉina Antikva Poezio

Shi Dazhu (?-?)

Odo al printempa pluvo

—laŭ melodio *Aroma luksa robo*

Printempa pluv' kun frida vento
 frapadas florojn ja kruele.
 Nebulo pluva salikarbojn
 vualas peze, mallibere.
 Malklaraj montras sin mil lioj
 da montoj kaj riveroj en vapore,
 verŝajne en etoso de malfrua primavero.
 Tuttage pluvo ĵonglas laŭ la volo,
 jen falas jen ĉesiĝas je onia ĝeno.
 Timeme papilioj pro humida flugilparo
 sin kaŝas kaj dormetas en ĝardeno.
 Hirundoj nun navedas por konstrui neston,
 portante la akvecan koton per buŝpreno.
 Plej embarasas geamantoj en ĉi tempo,
 ĉar vojo estas tro glitiga por la rendezvuo,
 ne eblas por kaleŝoj de fraŭlinoj
 veturi sur ĝi al la longe sopirata
 renkontĝuo.

La pluvo puŝas tajdojn sur la rivero

ja en vesperkrepusko sub streĉita vido.
 Pramejon malfacile oni trovas
 pro densa nebulbar' kaj akvrapido.
 La montoj en la foro diafanas,
 kvazau knabin' larmanta kun sorĉbela.
 Jen tie, kie nova verdo kreskas,
 falinta ruĝ' forfluas kune kun ĝen-ŝvelo.
 La pluvo batas la pirflorojn en la korto,
 mi fermas pardonon por trankvilo.
 Ĉe lampo dum profunda nokto
 mi legas klasikajojn kun ĝentilo.

Versoj dediĉitaj al hirundoj

—laŭ melodio *Paro da hirundoj*

Printempo jam alproksimiĝas al la fino.
 Supozeble la hirunda nest' lastjare
 kovriĝis per malvarma polvo.
 Nun paro da hirundoj solidare
 jen ĉirkaŭflugas la malnovan neston
 por vivi en ĝi kune, kare.
 Rigardas ili jen al trab' jen al plafono,
 pepante inter si babile tre familiare.
 Abrupte ili fluge tanĝas florojn,
 svingante la tondilforman voston pare.

Apude de la pad' humidan grundon
 buŝprenas ili, flugas ir-reire.
 Tre base al la tero ili flirtas vete,
 viglplene, glite kaj facile.
 Post satspektado al salikoj, floroj,
 reflugas ili al la domo jen leĝere
 kaj dormas en la nest' trankvile.
 Forĝesis tamen ili la mesaĝon perlivere
 de la fora edzo al l' edzino.
 Ŝi ĉagreniĝas en buduaro plensufere,
 sin apogante al pentrita balustrado,
 kaj sola ŝi rigardas foren ja sencele.



Yue Ke (1183-?)

Kiosko sur Beigu-monto

—laŭ melodio *Kanto pri Zhu Yingtai*

Disiĝis densdensa nebulo,
nun regas leĝera vaporo.
Herooj okupis kvazaŭ karusele
ĉi teron por brava la gloro.
Sub luno fiŝistoj netfiŝas
per frapoj ĉe la boatflank' kun fervoro
sur ondoj pelataj de vento.
Vizaĝe al tiu ĉi sceno kun bela koloro,
mi naskas ĉagrenon interne,
ne volas spektadi ĝin jen kun doloro.
Kaj nune invadas aŭtuna frid-vent' min
oldulon grizharan sen varma sangbolo.

Sur monto rigardas mi foren
al nord' batalejo antaŭa milita.
Mi volis kelkfoje batali kun glavo
sed mi ne sukcesis je l' faro merita.
La dispartigo de l' sudo kaj nord' de la
regno
min pikas dolore per ĝeno trepida.
En domo silenta dum nokt' mi aŭskulas
de ie al liutmuziko l' nove komponita.
L' urbopordo fermitas en vento malvarma,
laŭtiĝas sonado de hor-anoncad' intermita.

Zhang Ji (?-?)

—laŭ melodio *Luno super sabla strando*

Aŭtun' denove venas,
ĉagrenojn multajn ja mi kovas.
Velkintaj herboj sin etendas ĝis ĉielo,
kie la ter' de nia regn' sin trovas?

Martiroj mortis brave, sed ja kun rankoro,
de antikveco ĝis nun varmaj larmoj fluas,
kiel rivero kuras orienten al la foro.

Nun mi nur surŝultrigas la fiŝkanon
kaj iras al la sabla strando sub lungloro.

Liu Kezhuang (1187-1269)

La naŭa de la naŭa monato*

—laŭ melodio *Gratulo al novedzo*

La ĉielo malserena kaj senlima,
kaj oblikva vento kaj pluvstri'
des pli kirlas la ĉagrenojn
tumultantajn en mi kun anksi'.
Dank' al tur' centfuta alta,
povas mi ascendi alten pli
kaj direktas miajn oldan okulparon
al aŭtunaj scenoj kun vari'
de mil montoj kaj mil klifoj.
Kiel maljunulo kun grizharoj ĉe tempi',
mi disverŝas varmajn larmojn
ne por mia tristo, sed por la patri'.
Mi ja provas rememori l' pasintaĵojn,
sed jam ili malaperis sen konsci'.

En juneco mi fieris pri bonstilo en verkado,
sed nun la talento jam perdiĝis for,
kaj mi plenas nur je tristo kaj ĉagreno.
Ofte mi plendadas pri la manko de kolor'
nova en alies poezio kaj eseoj,
tamen mi mem kun obstina vol'
citas kliŝajn la ideojn de antikvo.
Se vizaĝe al flav-krizantemo dum ĉi hor',
oni ne per vino festas jen ĉi tagon,
tiuj flavaj floroj eble kun petol'
ja rikanus pri oniaj tristo kaj soleco.
La sovaĝanseroj flugas norden kun grakror'
kaj la suno sinkas okcidenten sen lumglor'.

**La naŭa de la naŭa monato laŭ la ĉina lunkalendaro estas la festo omaĝe al maljunuloj. Dum tiu tago oni grimpas la monton por celebri la feston.*

Elĉinigis



Vejdo (Ĉinio)



Zhuangzi

ĈAPITRO TRIDEK-TRIA

Sub la ĉielo

§33-03

Ne lasi sin ĝeni de la mondaj kutimoj; ne ornami sin per eksteraj beligaĵoj; ne esti tro postulema al aliaj; ne malobei la popolan volon. Deziri la pacon por ke la popolo en la mondo povu daŭrigi la vivon; kontentigi sin kaj aliajn je minimuma substanco bezono; lasi al ĉiu elmontri sian koron per paroloj. Ĉio ĉi tio estas inkluzivita en antikava taŭismo, al kiu alkroĉiĝis Song Jian kaj Yin Wen. Song Jian kaj Yin Wen tiel fervore dediĉis sin al la praktikado de la Taŭo. Ili portis ĉapon faritan en la formo de la monto Huashan, por esprimi sian ideon pri egaleco inter diversaj sociaj tavoloj. En siaj rilatoj kun ĉiuj estaĵoj de la mondo, ili komencis per la forigo de ĉiaj antaŭjuĝoj. Ili multe diskutis pri la psikologia stato kaj nomis ĝin la aktiveco de la menso. Ili adoptis mildan sintenon por akiri la favoron de la popolo kaj harmoniigi la mondon, prenante la subpremon de la personaj emocioj kaj deziroj kiel la kernon de sia doktrino kaj la ĉefan rimedon por atingi la celon. Dediĉante sin al la solvo de konfliktoj inter la popolo, ili ne prenis la humiliĝon kiel tian tiam, kiam ili estis malhonorataj. Ili kondamnis ofensivajn agojn kaj la uzon de armiloj, kun la celo elradikigi ĉiujn militojn kaj konfliktojn inter la regnoj en la tuta mondo. Kun tiaj opinioj ili vojaĝis de regno al regno, provante persvadi kiel la reĝojn kaj la ministrojn supre, tiel ankaŭ la ordinaran popolon malsupre. Kiam la aŭdantoj fariĝis surdaj al tio, kion ili

predikis, ili daŭrigis sian oratoradon. Kvankam ili estis malvarme traktataj ĉie, kien ili iris, tamen ili persistis ĉe sia entrepreno.

Malgraŭ ĉio, Song Jian kaj Yin Wen montris zorgemon multe pli al aliaj, ol al si mem. Ili diris: “Bonvole pretigu al ni nutraĵon nur el kvin *ŝeng*-oj da milio, kiu estos sufiĉa por ni.” Tiom malmulte da nutraĵoj apenaŭ sufiĉis por satigi la instruistojn, por ne paroli pri la studentoj, kiuj, eĉ en malsato, ne forgesis la mondajn aferojn. Ili laboris tage kaj nokte por la bono de la popolo, dirante: “Ni ĉiuj nepre devos plu vivi!” La imponaj trajtoj de ilia karaktero certe faris la impreson, kvazaŭ ili estus la savantoj de la mondo. “La homo kun nobla karaktero neniel malŝparas sian tempon sur bagateloj, nek faras ekscesajn postulojn al aliaj, nek lasas sin fariĝi sklavo de la materiala mondo,” ili daŭrigis la diron. Laŭ ili oni preferus ĉesi fari tion, kio estas senutila al la mondo, ol sin okupi je lamaj diskutadoj. Ekstere, ili kondamnis ĉiajn ofensivajn kaj la uzon de ĉiaj armiloj; interne, ili subpremis ĉiajn emociojn kaj limigis siajn dezirojn. Tiaj estis iliaj ideoj, grandaj aŭ etaj, subtilaj aŭ krudaj, al kiuj ilia konduto strikte konformis. Jen ĉio!

§33-04

Esti justa kaj senpartia; esti facile alirebla kaj malegoisma; sin adapti al la mondo sen altrudi sian propran volon al aliaj; konduki al aliaj sen hipokriteco; ne sin turni al la pripensado, nek konsulti sian sciadon; ne fari elekton inter la estaĵoj kaj lasi ilin ĉiujn sekvi sian naturan vojon de evoluo — jen la principoj entenataj en la antikva taŭismo. Peng Meng, Tian Pian kaj Shen Dao dediĉis sin al la praktikado de la antikva taŭismo.

Juĝi senpartie kaj objektive la estaĵojn, — jen ilia ĉefa principo. Ili diris: “La ĉielo estas kreita por kovri, sed ne por subteni; la tero estas

kreita por subteni, sed ne por kovri. La granda Taŭo entenas ĉion sen fari distingon.” Ili komprenis, ke ĉio havas sian aspekton kiel pozitivan, tiel ankaŭ negativan. Tial, kiel oni diras, “elekti signifas ekskluzivi; instrui signifas porti antaŭjuĝon; nur la Taŭo preterlasas nenion.”

Tial, Shen Dao forĵetis sian klorecon, forgesis sian memon kaj sekvis la vojon de la natura evoluo. Li prenis tion ĉi kiel sian gvidlinion en la komprenado de la ŝanĝiĝo de la naturo, dirante: “Se vi devigas vin ekscii, kion vi ne scias, vi estos premata de via sciado kaj sekve vi vin damaĝos.” Estante malpenema kaj agante laŭ la cirkonstancoj, li mokis tiujn, kiuj adoris la homojn virtajn kaj kapablajn; estante senbrida kaj lasante sin kateni de nenia regulo de konveneco, li riproĉis tiujn, kiuj respektis la saĝulojn.

Laŭ lia opinio la tranĉado aŭ pritondado devas esti farata laŭ la ŝanĝiĝoj de la cirkonstancoj; la pravo kaj la malpravo povas esti ignorataj, kondiĉe ke la homa fizika elĉerpiĝo estu evitebla. Li ne uzis la inteligentecon kaj takton, nek esploris la kaŭzojn kaj la sekvojn. Li nur staris tie aparte, senmove. Jen kion li rekomendis: Puŝu lin, kaj li ekpaŝos; trenu lin, kaj li antaŭeniĝos; li moviĝadu aŭ kiel kirlovento, aŭ kiel plumo, kiu flosas en la aero, aŭ kiel muelŝtono, kiu turniĝas; li peni esti senkulpa kiel en sia aktiveco, tiel ankaŭ en sia pasiveco, por eviti nenan mallaŭdon. Tiamaniere li povus esti neniel riproĉata.

Kial do tiel? La respondo estas, ke ĉiu, kiu havas nenan konscion pri la famo, neniel povas kaŭzi al si malfeliĉon per starigo de monumento al si, nek embarasi sin per uzo de inteligento kaj etaj artifikoj. Ĉio, kion li faras, estas konforma al la racio kaj logiko, tial li, kiel homo indiferenta por la honoro, povas ricevi

laŭdojn, nek mallaŭdojn dum sia vivo. Oni diras: “Por atingi la staton de indiferenteco, oni ne bezonas esti saĝulo. Peco da argilo neniam devias de la Taŭo.” La tiutempaj elitoj ofte kolektiĝis kaj mokis Shen Dao, dirante: “Lia doktrino estas kreita por la mortintoj, ne por la vivantoj, tial ĝi estas rigardata pli kiel stranga, ol kiel natura.”

Ankaŭ Tian Pian havis la saman ideologian tendencon. Li sekvis la skolon de Peng Meng, kiu donadis al li senvortajn lecionojn. La instruisto kaj la studento instruis kaj lernis per interkompreno. La instruisto de Peng Meng diris: “En la antikveco la personoj, kiuj vere komprenis la Taŭon, estis tiuj, kiuj atingis la staton ricevi nek laŭdojn, nek mallaŭdojn. Ĝi estas kiel rapida ekblovo de vento, kiu pasas lasante neniajn postesignojn. Kiel do oni povus esprimii ĝin per paroloj?” Ĉar la opinioj de Tian Pian kaj Peng Meng estis kontraŭ la komunaj deziroj de la popolo, ili altiris nenies atenton. Tio, kion ili nomis Taŭo, ne estis la vera Taŭo. En efektiveco neniu el la tri, Peng Meng, Tian Pian kaj Shan Dao, komprenis la Taŭon, kvankam ili devis kapti ion pri ĝi.

Elĉinigiŝ



Wang Chongfang

(Ĉinio)

Ĉineske

Yi Qiao (ĉino en Germanio)

Brizo primavera

— laŭ ĉinesko *Luno sur okcidenta rivero**

Oraj jaroj distaj
jen flagras kun aŭror’
Juneco delonge for,

restas en memoro.

Brizo primavera
karesas min en kor'.
Juna amo de fervor'
sorĉis kiel floro.

* *Luno super okcidenta rivero (ĉine: xijiangyue) ĉina fikforma poemo el du strofoj kun po 4 versoj de 66,7,6 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,a,a (x=senrima)*

Animo trankvila

— laŭ ĉinesko *Budhista dancisto**

Sur serena surfaco
de la maro en paco,
speguliĝas mont'
laŭ la horizont'.

Anim' trankvila
al mar' simila,
klaras kun radi'
pri la memkonsci'.

**Budhista dancisto (ĉine: Pusaman): ĉina fikforma poemo el du strofoj kun po 4 versoj de 7,7;5,5; / 5,5;5,5 silaboj kun para rimo*

Jadranka Miric (Serbio)

Ĉu mondo trovis luman eliron?

— laŭ ĉinesko *Sopir-al-sudo**

En anim'
longe zorgemo
nestis. Paco en mondo
malĉeestas. Sen emo
ne povas. Emo

homaron
determinas. Ĝi
kiel flor' plibeligas
pli allogas mondon ĉi.
Ho, savu nin, Di'.

Mizero
kaj sufero jam
regis en la mondo ĉi.
Memoru ni vivoflam'
Jes, kiam tiam

vekiĝos
homaro. Tio
savos mondon. Espero
kreskas en tradicio
tra homracio.

Adiaŭ
al ekspluatad',
al fi-altrudemuloj!
For, for de ni suferad'
nek pli militad'!

**Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fikforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).*

Laimundas Abromas (Litovio)



Malagraba okazintaĵo

Mi devas konfesi, ke tiuvespere mi faris absolute nenion. Mi kuŝaĉis sur la sofo kaj pripensis la sinsekvon de la eventoj de mia nova humuraĵo, kio – kvazaŭ malseka sapo – konstante glitis kaj glitis el miaj manoj. Mi koleriĝis.

„Atendu..., – mi timigis ĝin. – Mi kontentiĝos sen vi. Vi ne estas iu eksterordinara humuraĵo, sed simpla..., ĉiutaga, pri esperantistoj...“

Subite mi ekaŭdis, ke iu eniris mian ĉambron. Mi levis la kapon. Antaŭ mi staris iu nekonata persono. Kvazaŭ la kluba kasisto Petro, kvazaŭ la kursgvidanto Paŭlo. Aŭ eble ambaŭ samtempe, nur en unu persono.

– Kion vi volas? – mi demandis lin. – Ĉu mi povas helpi vin?

– Por mi malbonas, – komencis paroli la nekonatulo.
– Tre malbonas...

– Sciu vi, estimata, – mi intencis lin konsoli, – la fizikaj mankoj ne estas tiom teruraj... La spirita manko estas multe pli teruraj.

– Aŭtoro... – li subite ekploris.

Mi malfermis la buŝon. Tiu ĉi estulo klare kaj kortuŝe eldiris la vorton „aŭtoro“.

– Kion?! – mi konsterniĝis. – Vi komprenas ion malĝuste...

– Aŭtoro..., – ripetis li. – Por mi tre malbonas...

– Pardonu vi, tamen mi – ne estas „aŭtoro“, – mi ekbalbutis.

– Vi... vi ... Ne elturniĝu vi, – li parolis plorante. – Vi verkis pri mi, eĉ kelkfoje, en viaj humuraĵoj.

– Ne! – mi ekkriis. – Ne povas esti! Mi ne estas alkoholulo. Kaj ne degenerinto. Mi ĉion memoras!

– Aŭtoro... , – parolis la estulo. – Pro kio vi tiel faris...? Mi estas kluba prezidanto. Mi – Salamono.

– Ho! Do vi estas vere mia heroo... Sed pro kio vi estas tiom kripla, malklara? – po iomete mi komencis percepti la aferon.

– Vi verkis min tian, ne finformitan, kiel personecon. Neniu amikiĝas nun kun mi, ĉiuj preteriras senatente, sensalute. Iuj eĉ transiras la straton, por ne renkonti min .Kion mi faru nun? Kiam vi finverkis – vi ĝojis..., ĉu ne? – ne ĉesis paroli tiu, kiu nomis sin Salamono.

– Sidiĝu, bravulo, – mi parolis al tiu, kiu sin nomis Salamono kaj montris por li seĝon. – Mi volas iomete interparoli kun vi. Amike... Ĉu vi scias, kio estas malsana ambicio? Tiam, kiam oni volas esti pli bona ol aliaj, superi aliajn. Kiam sence oni kontraŭas, disputas, kverelas. Kiam mankas la modesteco. Kontraŭ tia ambicio necesas batali.

– Aŭskultu, aŭtoro..., – min interrompis tiu, kiu nomis sin Salamono. – Ni, ĉiuj, faras erarojn... Mi povas diri tion saman ankaŭ pri vi. Tio estas senpera devo de mi, kiel gvidanto de la klubo. Mi multon povus diri, tamen mi ne volas. Kaj tamen vi? Proksimumon, samideanon en la kavon vi puŝas... Mi povus multon diri, tamen mi ne diros. Ne indas difekti por si mem la humoron.

– Sed pro kio nestas en vi tiom da malsana ambicio? A? – mi interrompis paroladon de tiu, kiu nomis sin Salamono. – Mi volas malfermi al vi la belecon de modesteco. Ĉu vi kredas, ke vi estas neŝanĝebla? Mi povas diri, ke vi eraras kaj baldaŭ vi mem konvinkiĝos pri tio...

– Kion?! – li ekkriis. – Nur iu provu paroli tiel pri mi! Ĥa! Intelektuloj! Vi pensas, ke ili, tiuj geklubanoj ege saĝas?! Vi ne konas tiun ularon! Ili preferas klaĉi, fiparoli aŭ drinki, sed neniukaze lerni Esperanton. Ili estas amatoroj. Ĉu ili pri la problemoj zorgas? Ĉu ili lingvokonojn perfektigas?... Ĉu mi devas singardi min? Vi diras, ke mi hontos... Mi hontos...!? Vi devas honti!

– Mi ne scias, kion respondi al vi, – jam tedis al mi lia parolado kaj mi kontaŭatakis lin. – Mi konas geklubanojn. Dum multaj jaroj mi interrilatas kun ili. Mi mem estas unu el ili. Vi ne trompos min !

– Ĉu eblas kompreni la aŭtoron, kiu ne komprenas la heroon, ĉar heroo ne komprenas sin mem? Ne! Do jen..., – kolere parolis li.

– Kaj pri kio vi pensas nun ? – ne kuraĝe demandis mi.

– Pri io ajn...Pri tio, kiel pasas la tempo kaj griziĝas la haroj! Enkape io okazas...Io bruas, naskiĝas, mortas...

– Kaj pri la senco kaj esenco de Esperanto vi pensas? Nu, ĉu? — ne ĉesis demandadi mi. – Interese... Tre interese...

– Ĥa! Aŭskultu... Do, – pro kio vi altrudiĝas? – mi komencis koleri.

– Fiaŭtoro, vi verŝajne volas, ke mi batu vian vizaĝon? – jam kolere parolis tiu, kiu nomis sin Salamono. – Mi volonte...

– Pro kio? – mi aŭtomate demandis.

– Via vizaĝaĉo mem tion petas. Forte altiras via fizionomio, – li ŝovis sub mian nazon sian tatuitan pugnon. – Mi povas nun..., kaj tuj. Antaŭ nelonge mi frapis unu ulon, similan al vi. Mi rekomendas al vi trankviliĝi.

– Momenton, – mi petis tiun, kiu sin nomis Salamono, iomete atendi, por ke mi prenu notlibreton. – Vi saĝe parolas. Mi ion notos... Sekve estis tiel...

Ĉimomente en miaj okuloj ekstrebrilis lazuraj lumetoj. Falante mi eksentis, ke mi puŝis ion apude. Aŭ eble ne? Eble nur ŝajnis al mi.

– Helpu! – mi ekkriis, sin verŝante per malvarma ŝvito, kaj ... mi vekigis. Mi kuŝis surplanke apud la sofo.

– Mikaelo, ĉu por vi jam plibonas? – mi aŭdis afablan voĉon. Apud mi staris nur mia bona edzino Sonata. – Vi kuŝiĝu sur la sofon kaj ankoraŭ iomete kuŝu, ĝis ĉio malbona pasos. La kranio via ne rompiĝis. Vi nur kapon frapis. Pro kio vi kriis? Kiu atakis vin? Pro kio? – scivoleme interesiĝis mia edzino.

–Pro la kritiko, pro humuraĵo, – mi respondis mallaŭte kaj nevole.

Poste mi ekcerbumis, ĉu mi sonĝis, aŭ ĉu vere iu frapis min?

Du ĉinaj antikvaj eseoj

Ouyang Xiu (1007 – 1072)

La Olevendisto Avo

Chen Yaozi estis lerta en arkpafado, kaj tiutempe rivali kun li neniu povis. Pri tio fieris la sinjoro Chen. Iufoje li faris pafadon en sia placo, kiam venis olevendisto avo, kiu demetis la vekton, staris lin rigardante, kaj longatempe ne foriris. La avo trovis, ke la sinjoro pafas dek fojojn kaj dume trafas preskaŭ naŭ, kaj balancis la kapon iom jese.

Chen demandis la avon: “Ĉu ankaŭ vi bone konas la arton de arkpafado? Ĉu mia pafado ne estus lerta?” La avo respondis: “Tio estas nenio alia, ol ekzerciteco.” Ĉe la aŭdo de tio Chen falis en koleron, dirante: “Kiel vi kuraĝus malrespekti mian arkpafan arton?” La avo diris: “Mi bone komprenas la manieron per la sperto de oleverŝado.” Poste, li starigis sur la tero botelkukurbon, kies buŝon li kovris per kuprero kaj tra ties kvadrata truo verŝis oleon per ĉerpilo en la kukurbon, sed la kuprero malsekiĝis nenie. Tiam la avo aldonis: “Ankaŭ tio estas, por mi, nenio alia krom ekzerciteco.”

Fine, la sinjoro Chen ridetane elakompanis la avon, kiam tiu foriris.

Han Yu (768 – 824)

Parolo pri la ĉevalo

Antaŭe ekzistas Bole*, kaj poste la ĉevaloj, kiuj povas tage kuri mil liojn. Tiaj ĉevaloj ofte estas, sed tiu Bole ne. Sin trovas ja belkvalitaj ĉevaloj, kiuj tamen estas nur humiligataj sub la manoj de servistoj kaj kiel ordinara mortas en stalo. Ili ne povas honori sin per la titolo “mil-li-a ĉevalo”.

La ĉevalo, kiu tage kuras mil liojn, iafoje prenas manĝon en unu mezuro da nutraĵo. Sed la nutranto nutras ĝin ne kiel tage kurantan tra millia vojo. Tia ĉevalo, kvankam kapabla dumtage kovri la distancon de mil lioj, tamen manĝas nesate, tiel ke al ĝi mankas forto, kaj ne montriĝas en ĝi bela kvalito. Ĝi eĉ ne povas esti traktata kiel kutima ĉevalo, kaj kiel oni povus postuli ke ĝi plenumu galopadon de mil lioj dum unu tago?

Oni spronas la ĉevalon en erara maniero, nutras ĝin nesufiĉe, kaj ne bone komprenas la henon, sed tamen levas vipon antaŭ ĝi, dirante: “Sub la ĉielo ne ekzistas millia ĉevalo!” Ĉu vere ne estas tia ĉevalo? Estas vere, ke oni ne konas ĝin!

Bole:* Kromnomo de Sun Yang (ĉ. 680 a.K. – 610 a.K.), kiu estis lerta en pririgardo de ĉevalo kaj verkis la unuan monografion pri ĉevala pririgardo en la ĉina historio. Kaj sekve, en Ĉinio oni metafore nomas Bole trovanto de talentuloj.

Elĉinigis



Minosun (Ĉinio)

Eldonas Redakcio de *Penseo*

Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Veĵdo)

Retadreso: vejdo@163.com

www.elferno.cn/penseo/penlisto.htm